



同
話

Mikrofone



中华人民共和国国庆60周年



7-a jaro • Oktobro-Decembero, 2009





Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

ENHAVO

3

60-jariĝis la Ĉina Popola Respubliko

Solena jubileado

Gratuloj kaj bondeziroj el malproksimo

5

Sekvu Lina al 65-a IJK kaj 94-a UK

12

Intervjuo

Omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna, meritplena akcelanto de Esperanto

14

Tra la Mondo

15

Mikronovelo

Homo kaj Simio en zoo

Ĉe la sojlo de la Nova Jaro, sinsekve venas al ni leteroj kaj mesaĝoj kun salutoj kaj bondeziroj. Koran dankon al ĉiuj bondezirintoj kaj anticipan dankon al bondezirontoj!

Renkvvvvontante la Novan Jaron, ni elkore dankas vin pro viaj subteno kaj kunlaboro en 2009 kaj atendas vian pluan kunlaboron en 2010.

Feliĉan Novjaron kaj ĉion bonan al vi kaj viaj familianoj!

60-jariĝis la Ĉina Popola Respubliko

Solena jubileado



La 1-an de oktobro ĉi-jare, estis 60-jariĝo de la nova Ĉinio. Okaze de la 60-a datreveno de la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko, oni jubileis ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en ĉiuj anguloj de la mondo, kie troviĝas ĉinoj.

Antaŭtagmeze de la sama tago, sur la placo Tian'anmen en Pekino, okazis celebra mitingo, en kiu partoprenis diversnaciecaj reprezentantoj el diversaj rondoj de Pekino, tiuj el diversaj provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj, Hongkong, Aomen kaj Taiwan, transmaraj elmigrintaj ĉinoj kaj fremdlandaj amikoj, entute ĉirkaŭ 200 miloj da homoj.

Ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ŝtata prezidanto kaj prezidanto de la Centra Milita Komisiono Hu Jintao revuis 44 imponajn kaj majestajn falangojn konsistantajn el tera, mara, aera trupoj kaj la dua artilerio de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, trupoj de Popola Armita Polico, milicio kaj rezerva militservo. Li revuis ankaŭ la 30 ekipajn falangojn, gvidatajn de la vicaro de novaj tankoj de la tipo 99. Ĉiuj revuitaj ekipaĵoj, inkluzive de antaŭavertaj aviadiloj, novgeneraciaj militaŭtoj, novaj radaroj, senpilotaj aviadiloj kaj aparatoj

de satelita telekomunikado, estas faritaj de Ĉinio mem.

Tiuj, kiuj unuafoje aperis en la revuo, estas falangoj de la armita polico, novaj radaroj, telekomunika trupo, senpilotaj skoltaviadiloj kaj kromzomisiloj.

Ĉinio laŭplane kaj laŭpaŝe antaŭenpuŝos plu modernigon de la nacidefendo kaj la armeo en la nova jarcento kaj fundamente atingos la celon de la modernigo de la nacidefendo kaj armeo en la mezo de la 21-a jarcento.

Ĉinio persistas en la orientilo de kunakorda konstruado de la ekonomio kaj nacidefendo, kaj donas egalan atenton al la nacia riĉigo kaj armea fortigo por ke disvolviĝo de la nacidefendo kaj armeo konformu al la ŝtata disvolva strategio.

Ĉinio sekvas defensivan nacidefendan politikon, tenas super ĉio la defendon al la ŝtata suvereneco, sekureco kaj teritoria integreco, garantion de ŝtataj disvolvaj intereso kaj protektadon de popolaj intereso, kaj penas por konstrui firman nacidefendon kaj fortan armeon, konforme al la sekureco kaj disvolvaj intereso de la ŝtato.

Ĉinio efektivas la militan strategion de aktiva defensivo. Strategie Ĉinio persistas en la principo de defensivo, sindefendo, kaj rebato kontraŭ atako.

En la nova periodo Ĉinio persistas ĉe la starpunkto gajni lokan militon sub la kondiĉo de informa teknologio,





substrekas bridon de krizo kaj milito kaj altigas la armean kapablon respondi al sekurecaj minacoj kaj plenumi diversajn taskojn.

Ĉinio pripersistas kaj disvolvas la strategion de popola milito kaj, sin apogante sur la popolo, konstruas la nacidefendon kaj armeon.

Ĉinio insistas pri la nova sekureca ideo de interfido, reciproka utilo, egalrajteco kaj kunlaboro, kaj persistas ĉe la opinio solvi internaciajn disputojn kaj varmajn problemojn per paca maniero, movas dialogojn kaj kunlaborojn inter diversaj landoj pri la sekureco, oponas vastigon de milita alianco kaj agreson kaj ekspansion. Ĉinio promesas, ke ĝi neniam ĉasos hegemonion, nek faros militan ekspansion.

Ĉinio alte levas la flagon de paco, disvolvo kaj kunlaboro, prenas plu la vojon de paca disvolvo, sekvas la malferman strategion de reciproka utilo kaj komuna gajno, kaj antaŭenpuŝas konstruadon de la harmonia mondo, longedaŭre paca kaj komune prospera.

En la mitingo prezidanto Hu Jintao donis salutvortojn. Li diris:

“Saluton, ĉiuj samlandanoj, kamaradoj kaj amikoj! Hodiaŭ ni solene mitingas por celebri la 60-an datrevenon de la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko. En tiu ĉi feliĉa kaj solena okazo diversnaciecaj popolanoj de la tuta lando tre fieras pri disvolviĝo kaj progreso de la granda patrolando kaj havas plenan fidon pri la brila perspektivo de la granda repotenciĝo de la ĉina nacio. Nome de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Tutlanda Popola Kongreso, la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj

la Centra Milita Komitato, mi esprimu profundan memoron pri ĉiuj revoluciaj pioniroj kaj martiroj, kiuj faris senmortajn heroaĵojn por sendependeco de la nacio, liberiĝo de la popolo, riĉiĝo kaj fortiĝo de la lando kaj feliĉo de la popolo, diru varman gratulon al popolanoj de la tuta lando kaj transmaraj kaj internaj patriotaj samlandanoj, kaj koran dankon al diverslandaj amikoj, kiuj prizorgas kaj subtenas la disvolvon de Ĉinio.

“La saman tagon antaŭ 60 jaroj, la ĉina popolo akiris grandan venkon de la ĉina revolucio post la sanga batalado en pli ol 100 jaroj, kaj prezidanto Mao Zedong ĉi tie solene proklamis al la tuta mondo la fondiĝon de Ĉina Popola Respubliko. La ĉina popolo finfine stariĝis, kaj la ĉina nacio kun la civilizacia historio de pli ol 5 000 jaroj ekiris en la novan historian eraon de evoluo kaj progreso.

“En la pasintaj 60 jaroj sub la gvidado

de la tri-generacia partia estraro kun Mao Zedong, Deng Xiaoping kaj Jiang Zemin kiel la kernoj, kaj de la Centra Komitato de la Partio ekde la 16-a Tutlanda Kongreso, la diligenta kaj intelekta popolo de Ĉinio venkis diversajn malfacilojn kaj riskojn per unuanima kaj penema laboro, atingis grandan sukceson atentatan en la tuta mondo, kaj komponis entuziasmigan triumfokanton de la senlaca batalo. Nun en la oriento de la ter globo majeste staras Ĉinio, la socialisma lando, vizaĝanta al la modernigo, la mondo kaj la estonteco.

“La 60-jara disvolviĝo de nova Ĉinio plene atestas, ke nur socialismo povas savi Ĉinion, kaj nur reformado kaj malfermo povas disvolvi Ĉinion, socialismon kaj marksismon. La ĉina popolo havas la fidon kaj kapablon bone konstrui sian patrolandon kaj fari sian farendan kontribuon por la mondo.

“Ni firme persistos en la socialisma vojo kun la ĉina trajto, komplete sekvas kaj efektivigos la bazajn teorion, linion, programon kaj sperton de la partio, liberigos plu penson, daŭrigos la reformadon kaj malfermon, movos la sciencan disvolvon, akcelos la socion harmonia, antaŭenigos la kompletan konstruadon de la bonhava socio, senĉese kreas novan situacion de la socialisma afero kun la ĉina trajto, kaj verkos novan ĉapitron de la bela vivo de la popolo.

“Ni firme persistos en la orientilo de ‘paca reunuiĝo kaj unu lando kun du socisistemoj’, pluigos longedaŭrajn prosperon kaj stabilecon en Hongkong kaj Aomen, antaŭenpuŝos la pacan disvolvon de la rilatoj inter la du bordoj de la markolo Taiwan, kaj batalos plu por realigi kompletan reunuiĝon de la





patrolando, la komunan deziron de la ĉina nacio.

“Ni firme persistos en la plenumado de sendependa, memdecida kaj paca diplomatia politiko, prenos plu la vojon de paca disvolvo, sekvos plu la malferman strategion de reciproka utilo kaj komuna gajno, amike kunlaboros kun ĉiuj landoj surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto, antaŭenigos plu kune kun diverslandaj popoloj de la mondo la noblan aferon de la paco kaj evoluo de la homaro kaj akcelos konstruadon de la harmonia mondo, longedaŭre paca kaj komune prospera.

“La Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la Popola Armita Polico devas disvolvi kaj daŭrigi la gloran tradicion, intensigi sian konstruadon, efektive plenumi la mision, kaj fari novan meriton por protekti ŝtatan suverenecon, sekurecon kaj teritorian integrecon kaj defendi la mondan pacon.

“La historio donas al ni la inspiron, ke la vojo neniam estas ebena, tamen la popolo, kiu tenas sian propran sorton kaj estas en solidareco, certe povas venki ĉiajn malfacilojn kaj senĉese krei historian heroaĵon.

“Rigardante al la estonteco, Ĉinio havas tre belan perspektivon de la evoluo. La tuta partio, la tuta armeo kaj la tutlanda diversnacieca popolo devas esti en ankoraŭ pli kompakta solidareco, alte levi la grandan flagon de la socialismo kun la ĉina trajto, progresi kun la tempo, kuraĝe antaŭeniri plu al la grandioza celo konstrui riĉan, potencon, demokratian,

civilizacian kaj harmonian socialisman modernan landon kaj realigi la grandan repotenciĝon de la ĉina nacio, kaj fari plu per diligenta laboro kaj senlaca peno novan kaj pli grandan kontribuon por la homaro!

“Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!

“Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!

“Vivu la granda ĉina popolo!”

Poste komenciĝis la parada marŝo de armeaj trupoj. La armitaj fortoj de Ĉina Popola Respubliko konsistas el servantaj kaj rezervaj trupoj de la Ĉina popola Liberiga Armeo, kaj trupoj de la Popola Armita Polico kaj milicio. 14 piediraj falangoj, 30 ekipaj falangoj kaj 12 aviadilaj eskalonoj venis el malsamaj arme- kaj armil-specoj de diversaj militaj regionoj, trupoj de la armita polico, kaj pekinaj rezervaj trupoj.

La revuataj trupoj en majestaj kaj ordaj formacioj pasas preter la pordego Tian'anmen. Ili montras al ĉinaj ŝtataj gvidantoj, la ĉina popolo kaj la tuta mondo brilajn atingojn de la ĉina armeo, rivelas novan fizionomion, prezentas mision kaj firman decidemon por la nova jarcento, kaj manifestas grandan forton protekti rajtojn kaj interesojn de la ŝtato kaj akceli pacon kaj disvolviĝon de la mondo. Ĝi estas popola armeo marŝanta al nova venko kaj brila sukceso!

Ekzemple la falango de nukleaj misiloj. Nuklea strategia forto estas la evidenta signo de la kapablo de la ĉina nacidefendo. Pro la disvolviĝo de strategiaj armiloj kaj ekipaĵoj de Ĉinio

senĉese altiĝas la kapablo bridi militan krizon kaj protekti la mondan pacon. Ĉinio ĉiam sekvas la politikon ne uzi la unua nuklean armilon, persistas pri la sindefenda strategio, kaj fari neniun konkuron kun iu aj lando pri nuklea armado. Kutime misiloj kaj nukleaj armiloj de la ĉina trupo direktiĝas al neniu lando; Ĉinio plialtigas la gardon kaj pretas por rebato, nur kiam ĝi estas minacata per nukleaj armiloj; ĝi uzas nukleajn misilojn, nur kiam ĝi estas atakita per nukleaj armiloj. Kiel respondeca lando Ĉinio aktive kontribuas por la paco kaj disvolviĝo de la mondo. La misila trupo, plej atentata inter ĉinaj trupoj. Kvin ekipaj falangoj en grandioza kaj majesta formacio estas revuataj. Jen la unua. Ĝi venis el la brigado de konvencijaj misiloj de la tipo Dongfeng 15B. La misila trupo estas kerna forto de la ĉina strategia nuklea deadmono. Ĝi portas la taskon bridi nukle-armilan uzon de alia lando kontraŭ Ĉinio kaj plenumi nuklean rebaton, kaj precizan baton de konvencijaj misiloj.

La gvida eskalono en la formacio de pluraj aviadiloj flugis super la placo Tian'anmen. La unua el la formacio estis





antaŭaverta aviadilo de la tipo 2000. La flugdemonstracia teamo Bayi plenumis la eskortan taskon. La flugdemonstracia teamo Bayi eljetis rubandojn da brilaj kaj koloraj fumoj. Inter la revuataj eskalonoj estas ĉiu-tipaj servantaj aviadiloj, faritaj de Ĉinio mem. Kaj la eskalono de benzinprovizaj aviadiloj. Ĝi konsistis el 2 benzinprovizaj aviadiloj kaj 4 novtipaj batalaviadiloj. Modernaj benzinprovizaj aviadiloj alportis al la aerarmeo revolucionan ŝanĝiĝon. La unua-generacia benzinproviza aviadilo, projektita de Ĉinio mem, povas samtempe provizi du aviadilojn per oleo.

La ĉina nacio estas pacama. Ĉinio konsekvence firme sekvas sendependan, memdecidan kaj pacan diplomatian politikon kaj defensivan nacidefendan politikon, persistas pri la nuklea sindefenda strategio, kaj sin dediĉas por starigi harmonian mondon, longedaŭre



pacan kaj komune prosperan.

Sekve estis parado de popolamasoj, kiu havis sep ĉeftemojn: Penado por entreprenado, reformado kaj malfermo, transpaŝo de jarcento, scienca disvolvigo, brila atingo, pitoreska Ĉinio kaj bela estonteco. Tra la placo Tian'anmen pasis 36 procesioj de 100 000 popoloj reprezentantoj kaj 60 paradveturiloj, kaj 6 prezentadaj trupoj. Sur la placo 80 000 junuloj prezentis 41 grandajn bildojn kaj 49-foje ŝanĝi la fonon.

Ekzemple, la falango de sporta disvolvigo konsistanta el sportistoj, sportaj laborantoj kaj amatoroj kun la ornamita kamiono reprezentas respektive tutpopolan korpofortigon, tradician sporton kaj konkursan sporton. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la konstitucio de la ĉinoj ĝenerale altiĝas kaj la aktivado de la ĉinoj en sportado ĉiam restas en entuziasmo. La ĉina registaro decidis, ke ekde la kuranta jaro, la 8-a de aŭgusto estu tago de "tutpopola korpofortigo" de Ĉinio. De sportaj konkursejoj tra la mondo sin sekvis novaĵoj pri venko de ĉinaj sportistoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĉinaj sportistoj gajnis sume 2 300 ĉampionecojn de la mondo kaj kreis mondan rekordon preskaŭ je 1 200 fojoj. Ĉinio jam estas vera granda lando de sporto kaj nun estas marŝanta al "potenca lando de sporto". De la 8-a ĝis la 24-a de aŭgusto 2008 Ĉinio sukcesis okazigi Olimpikojn kun propraj trajtoj kaj alta nivelo. La falango de la Pekinaj Olimpikoj nun alvenas al ni. Tiu ĉi falango konsistas el reprezentantoj de la olimpikaj volontuloj, konstruistoj kaj laborantoj, ili enkorpigas la ĝojon de la ĉina popolo realigi la cent-jaran sonĝon pri la Olimpikoj.

Krome la procesio de reprezentantoj de la spacialaj teknikistoj spegulas, ke en la 60 jaroj la ĉina spaconavigado saltis el nenio en la antaŭan vicon de la mondo. De la senhoma eksperimenta spacoŝipo Shenzhou n-ro 1 ĝis la sukcesa lanĉado de la homportaj spacoŝipoj Shenzhou n-ro 6 kaj n-ro 7 ĉinoj faris grandan salton. En 2003, Yang Liwei veturis en la spacon per la homporta spacoŝipo Shenzhou n-ro 5, produktita de Ĉinio mem, kaj fariĝis la unua ĉino en la spaco. Pro tio Ĉinio estas la tria lando, kiu povas procedi pri spaconavigado per homporta spacoŝipo! Spaca heroo Zhai Zhigang veturis en la spacon per la homporta kosmoŝipo Shenzhou n-ro 7 kaj faris spacopromenon dum 19 minutoj kaj 35 sekundoj.

Pri tiuj du-flankaj atingoj vi certe bone informiĝis en la antaŭaj numeroj de nia Mikrofone.

Ni aparte menciuj la prezentitan ornamitan kamionon "Trezora Insularo Taiwan". Taiwan situas ĉe la sudorienta marareo de Ĉinio. De la antikveco Taiwan estas nedisigebla parto de la ĉina teritorio. Nuntempe, la rilatoj inter la du bordoj restas en paco kaj disvolvigo, tio konformas al la komuna deziro de la popoloj de la du bordoj.

Maje de la pasinta jaro, kiam okazis la fortega tertremo en la gubernio Wenĉuan de la provinco Sichuan, popoloj de Taiwan aktive oferis monon por la plagitoj; aŭguste de la kuranta jaro, kiam Taiwan estis grave batita de la tajfuno Morako, popoloj de la ĉeftero sinsekve kontribuis monon kaj objektojn por la plagitaj taiwan-aj samlandanoj, ĉio ĉi prezentas la nedisigeblan parencecon de la dubordaj popoloj.

Historio kaj praktiko de tempo al tempo pravas, ke la sorto de la diversaj naciecoj kohere kunligiĝas kun la sorto de la lando. La unueco de la lando estas la plej alta intereso de la diversaj naciecoj. Interhelpo, solidareco kaj amikeco estas la fonto de la forto de la ĉina nacio kaj ankaŭ estas baza subpartilo de Ĉinio por krei miraklojn unu post alia.



Gratuloj kaj bondeziroj el malproksimo

Okaze de la 60-jariĝo de la Ĉina Popola Respubliko, multaj aŭskultantoj el diversaj landoj sendis al ni mule da leteroj kaj mesaĝoj kun varmaj gratuloj kaj bondeziroj. Nun ni elekte menciu iujn:

Gratulo kaj bondeziro deksprezidanto de UEA Renato Corsetti el Italio:

“Mi volas esprimi al vi mian personan ĝojon pro la 60-jariĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Eble post kelkaj generacioj oni plene povos kompreni la valoron de la Ĉina Popola Respubliko, kiu signifis por la ĉina popol-amaso la komencon de epoko, en kiu ĉiuj estas konsiderataj homoj en Ĉinujo. Mi ne troigas. Vi mem povas scii pri la aziaj landoj, kie tio ankoraŭ ne okazas.

“Krom por la ĉinoj, la Ĉina Popola Respubliko havis grandan signifon ankaŭ por la eksterlandanoj, kiuj havis ekzemplon por sekvi.

“Nun, en momento de granda transformiĝo, Ĉinujo pluasertas sin granda lando en la mondo, kaj kapabla igi la mondon multpolusa, por ke ne okazu unulanda hegemonio, sed multkultura kaj multcentra mondo.

“Kvankam ĉinoj mem ne tute komprenas tion, ili estas la kondiĉo por ke Esperanto havu ankoraŭ ŝancojn en la estonteco. En imperia mondo ne estas aliaj eblecoj ol paroli la lingvon de la imperiestro. En mondo multcentra oni bezonas mondan lingvon.

“Multajn bondezirojn al la Ĉina Popola Respubliko!”

Gratulo kaj bondeziro de ĉeĥa amiko Jiri Patera:

“Kun granda fiero el ne tre prosperanta lando mi observas la gigantan evoluon de la nuna evoluanta grandpotenco. En niaj ĵurnaloj aperas nun multaj artikoloj pri Ĉinio kaj la komentistoj venas al klara konkludo, ke en la 21-a jarcento en la mondo estos du grandaj potencoj Usono kaj Ĉinio, el kiuj poste la potenco n-ro unu nepre estos Ĉinio.

“Antaŭ 60 jaroj la tiam Ĉeĥoslovakio estis la tria lando, post Sovetunio kaj Pollando, kiu oficiale rekonis (agnoskis) la Ĉinan Popola Respubliko. Mi opinias, ke se la ŝtatoj de la mondo dediĉus siajn fortojn al paca kaj ekonomia kunlaboro, tiam neniam plu devus aperi

ia militdanĝero. La ŝtatoj ne plu devus rigardi en aliaj ŝtatoj malamikojn, sed eble rivalojn strebantajn al pli rapida kaj pli granda prospero de sia popolo. Tiaspeca paca konkurado povus elimini senutilajn militelspezojn kaj tiel kontribui al la ekonomia prospero de la tuta mondo.

“Mi deziras al vi multe da feliĉo, sanon kaj konstantan prosperon al via bela granda lando.”

Bondeziro de Goumidi Mohamed el Alĝerio:

“Varman gratulon al la 60-jariĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Dum la pasintaj 60 jaroj, Ĉinio sin turnis de malriĉa kaj malprogresinta lando al la prospera kaj forta lando.”

Bondeziro de Davudov Magomed el Azerbajĝano:

“Mi gratulas vin okaze de la 60-jariĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Mi sentas agrablon, leginte la vortojn de prezidanto Mao Zedong pri Esperanto: ‘Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel la formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.’”

Bondeziro de Edvaldo Silva Machado el Brazilo:

“Kun granda ĝojo mi elkore gratulas al ĉi tiu honora lando por 60-a datreveno de la fundiĝo de Ĉinio. Mi admiras la amikan kaj fratecan popolon kaj deziras al ĝi feliĉon kaj prosperon ĉiame.”

Bondeziro de Petro Zilvar, Zsofia Korody kaj Harald Mantz de Germana Esperanto-Centro:

“Okaze de via jubileo, ni elkore gratulas kaj por la estonteco ni deziras al vi sukceson, benon kaj ĝojon sur ĉiuj pozitivaj vojoj.

“Pri estonta praktika esperplena interlaborado ni ĝojas, ankaŭ pro la fakto, ke ni estas la unua oficiala Esperantu-urbo de la mondo.”

Bondeziro de Jgnat Bociort el Germanio:

“Mi estas longjara kaj varma amiko de Ĉinio. Nuntempe mia sola timo estas ke la faroj de pluraj monavidaj ĉinoj detruos la socialisman ideon en Ĉinio. Tutkore mi bondeziras la landon, ĉi-momente plej prosperan en la mondo.”

Bondeziro de Edeltraut Henning el

Germanio:

“Mi elkore gratulas Ĉinion je la 60-jara datreveno de ĝia fondiĝo! Mi admiras la progresojn de Ĉinio en industrio, agrikulturo, scienco kaj tekniko kaj aliaj kampoj. Mi ĝojas kune kun vi pri la riĉiĝo de la vivo de la tuta ĉina popolo.”

Bondeziro de Barkanyi Istvan el Hungario:

“Mi varme deziras al Ĉinio, ke la ĉina popolo, kune kun la partio kaj registaro, atingu gravajn rezultojn en ekonomio, scienco, tekniko kaj kulturaj aferoj, plu perfektigu politikan kaj socian agadojn, plu evoluigu la homajn rajtojn, plu altigu la vivnivelon de la loĝantoj, ĉar sen tio la riĉuloj estos pli riĉaj kaj la malriĉuloj estos pli malriĉaj, plu daŭrigu la Esperanto-radioelsendojn!”

Bondeziroj de Alice Amalia Klein kaj Marcia Klein el Brazilo:

“Gratulon al Ĉinio pro ĝia granda ekonomia progreso, dank’ al kio Ĉinio okupas la 4-an lokon en la mondo! Estas granda feliĉo loĝi en Ĉinio.”

Gratulojn kaj bondezirojn sendis ankaŭ Karine Arakeljan kaj Nina Bzhikyan el Armenio, Albert Reiner kaj Leopold Patek el Aŭstrio, Abel Weiner kaj Jennifer Bishop el Aŭstralio, Alice Amalia Klein kaj Marcia Alice Klein, Wolmar Campostrini, Wilson Aragão Filho, Sebastiao Rosa Machado kaj Reinaldo Marinho el Brazilo, Angel Ivanov Maglov el Bulgario, Jindřich Tomášek kun edzino Krystyna el Ĉeĥio, Honoré Sebuĥoro el Francio, Adalbert Masuhr kaj Anton Kronshage el Germanio, Rafael Martinez el Hispanio, Jozefo Kiss el Hungario, Mitsunori Kawazoe el Japanio, Arimantas Račkauskas el Litovio, Amin Najmi el Maroko, Hans Adriaanse el Nederlando, Jawaid Eahsan el Pakistano, Urszula Mokrzycka el Pollando, Olah Judit el Rumanio, Aleksandr Titajev kaj Vjaĉeslav Suslov el Rusio, Dieter Rooke el Svislando kaj multaj aliaj. Koran dankon al ĉiuj skribintoj!

Ĉina Radio Internacia,
parolas en Pekino...

CRJ
CHINA RADIO INTERNATIONAL
中国国际广播电台

★ **世界语广播开播45周年**
JUBILEO DE ESPERANTO - DISAŬDIGO DE
ĈINA RADIO INTERNACIA

Verda Ondo tra la Mondo, Amikeco trans la Limo

Esperanto estas kreita de pola okulisto doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhofo. Ĝi publikigis en la jaro 1887, kaj enkondukigis en Ĉinion en la jaro 1909.

La 9-an de decembro, 1939, Mao Zedong skribis epigrafon por Esperanta ekspozicio: "Mi dirus ankoraŭ la samon: se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata".

En la fino de 1950-aj jaroj la tiama Radio Pekino (la nuna Ĉina Radio Internacia) komencis la preparon pri E-disaŭdigo.

En la jaro 1962 la tiama Pekina Brodkasta Instituto funkciigis E-kurson kaj komencis trejni esperantitajn oficistojn. Aŭguste de la jaro 1963 la unua kurso finiĝis. Gao Hui kaj Li Yuping estis sendata al la internacia sekcio de la Nacia Radio-Administracio kaj komencis la preparon por E-disaŭdigo. En la komenco de la jaro 1964 Liu Junfang, Nan Youli kaj Wang Yuqin diplomiĝis el la dua E-kurso kaj aliĝis al la preparo, kaj poste oficiale fondiĝis la E-redakcio de Radio Pekino.

La 19-an de decembro, 1964, Radio Pekino oficiale komencis la E-disaŭdigon. En la komenca periodo la disaŭdigo estis direktata al la regiono kun Varsovio

kiel la centro. 30-minuta programo estis elsendata en ĉiu sabato, kaj ripetigis dimanĉe.

De la jaro 1980 la ĉiutaga programo elsendiĝas al Nordorient-Azio, Sudorient-Azio, Eŭropo kaj Lantin-Ameriko. Aprile de la jaro 1998 la E-redakcio aldonis aktualajn al la programo kun ĝisdataj novaĵoj, kaj komence de la jaro 2003 la ĉiutaga programo daŭras en unu horo.

En 2003, por pliproksimiĝi al legantoj kaj aŭskultantoj la E-redakcio establis la trimestran kurieron Mikrofone. En la jaro 2007 la trimestra revuo ekhavis novan version de kolora presado kaj la enhavo pliiĝis. Ĝi estas sendata al pli ol 1 500 legantoj en pli ol 70 landoj.

La 5-an de majo, 2002, fondiĝis retpaĝaro de la E-redakcio de ĈRI. La E-redakcio grandskale renovigis la retpaĝaron du-foje respektive en 2003 kaj 2008, kaj post tio la retpaĝaro havis pli ol 80 subrubrikojn, kaj la ĉiumonata vizitkvanto atingis 150 milojn. En 2009 la redakcio turnis sian atenton al retradio konforme al postulo de la estraro de ĈRI, kaj denove renovigis la retpaĝaron. Nun en la retpaĝaro estas retradio, videospekto kaj kelkaj subrubrikoj, aldonitaj speciale por interago kun la celgrupoj; kaj la kuriero Mikrofone estas legebla en la retpaĝaro. Post la lasta renovigo la ĉiumonata vizitkvanto de la

retpaĝaro superis eĉ 200 milojn.

Post la disvolvigo en la 45 jaroj la E-redakcio plifortiĝis kaj fariĝis pli ampleka kun funkcioj de redaktado, novaĵ-kolektado, tradukado, elsendo kaj esploro. Nun ĝi havas 15 laborantojn (inkluzive de 2 ne-oficialaj kaj 4 redungataj post emeritiĝo).

Sub la gvidado de direktoro Zhao Jianping ĉiuj membroj de la E-redakcio de Ĉina Radio Internacia diligente laboras. De la jaro 2000 entute 22 programeroj kaj retaj raportoj de la sekcio



gajnis diversajn premiojn.

De la 45 jaroj la E-sekcio aktive faras internaciajn interŝanĝojn kaj kunlaborojn. De la jaro 1978 la sekcio ĉiujare sendas unu aŭ du raportistojn al la Universala Kongreso de Esperanto por raporti tiun ĉi gravan eventon, partopreni en diversaj seminarioj, intervjui famajn esperantistojn kaj okazigi kunsidon de aŭskultantoj. Ĝis nun raportistoj de la E-sekcio vizitis pli ol 30 landojn de la 5 kontinentoj.

Ni atribuas la disvolviĝon kaj progreson de la E-disaŭdigo ankaŭ al niaj aŭskultantoj kaj legantoj en pli ol 60 landoj pro iliaj subtenoj kaj kontribuoj. Ĉiujare ni ricevas pli ol 8 000 leterojn el ili. Por diverslandaj aŭskultantoj la E-disaŭdigo estas la fenestro koni Ĉinion kaj ankaŭ portas la esperon kaj noblan ideon. La E-disaŭdigo senĉese disvolviĝas ĝuste pro la inspiro kaj subteno de la aŭskultantoj. Okaze de la 45-jara jubileo

ni ricevis gratulojn kaj dezirojn el oficistoj de UEA kaj fervoraj aŭskultantoj.

Julie de la kuranta jaro la E-sekcio denove rearanĝis la retpaĝaron por strategia ŝanĝo. Ĉe la nova startpunkto ni plirapidigos la disvolvon kaj forĝos la E-disaŭdigon pintklasa, pli influhava, kaj plaĉa al celgrupoj, por ke ĝi estu la fenestro koni Ĉinion kaj la hejmo de esperantistoj.

Gratulmesaĝojn kun bondeziroj

Okaze de la 45-jariĝo de nia elsendo, aŭskultantoj el diversaj mondpartoj sendis al ni gratulmesaĝojn kun bondeziroj. Ni citu kelkajn:

Bondeziroj de Jiri Patera el Ĉeĥio:

Okaze de la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI, bonvolu akcepti miajn sincerajn gratulojn kaj samtempe dankojn pro via grandega laboro. Mi deziras al Ĉinio kaj al la ĉina popolo ĉion bonan, pluan konstantan progreson kaj feliĉan vivon en paco. Kaj la samon al ĉiuj anoj kaj kunlaborantoj de via Redakcio!

Viaj elsendoj estas tre gravaj por mi kaj mi deziras al vi pluajn sukcesojn en via laboro kaj konstantan prosperon kaj feliĉon en via vivo. Kaj mi tre ĝojas vidante la grandan progreson de Ĉinio kaj la kreskon de la vivnivelo de la ĉina popolo.

Vivu la granda Ĉinio!

Gratulo kaj bondeziroj de Mario Amadei el Italio:

Mi, fidela aŭskultanto de jam pli ol 25 jaroj, sendas al vi la plej korajn, varmajn saluton kaj gratulon okaze de via 45-jariĝa elsendo.

Viajn programerojn mi multe ŝatas kaj de tempo al tempo raportas pri ili dum niaj klubaj kunvenoj. Mi jam informis la klubanojn por la aŭskultado de la speciala programo pri la celebrado en la 19-a de decembro.

Nun mi tutkore gratulas vin ĉiujn pro via grava laboro. Plensukceson al vi en la nova jaro!

Gratulo de UEA-Delegito Iván Mättig Catalán el Santiago, Ĉilio

Tre specialan saluton al ĉiuj laborantoj de ĈRI, okaze de la 45-a datreveno de via Esperanto-elsendo.

Mi deziras al vi sukcesojn en via bela kaj aplaŭdinda laboro kaj gratulas vin pro la senlaca kaj elstara laboro!

Gratulmesaĝo de Leopold Patek el Aŭstrio:

Kiam mi, la 15-an de julio 1977, la unuan fojon sukcesis aŭskulti vian Esperanto-programon, mi ne povis imagi, ke via programo akompanis min 32-jarojn kaj espereble pli. Pri la enhavo de tiu ĉi disaŭdigo mi nenion memoras, ĉar tiam mia ĝojo estis tro granda por serioze sekvi la enhavon. Ekde tiam mi iĝis konstanta aŭskultanto de via elsendo kaj helpe de viaj programoj mi konatiĝis iom post iom pli kun via lando.

Mi ne povis imagi, ke mi nun povas aŭskulti vian programon per komputilo, sen perturboj kaj kiel eŭropano eĉ mezonde.

Mi scias, ke tiu ĉi sukceso ne falis el la ĉielo, sed postulas multajn klopodojn de la kunlaborantoj de la Esperanto-sekcio, pro tio mi ege dankas al ĉiuj kunlaborantoj!

Gratulo de Ntaw Hubert el Ugando:

Kvankam ni malfacile kaptas la E-elsendon de ĈRI, tamen ni regule ricevas kaj legas la gravan mirindan Mikrofona, kiu disvastigas Esperanton tra la tuta mondo.

Ni, anoj de la granda esperantista familio "Virunga E-Klubo", malgraŭ ĉiu-taga malsekureco kaj milito en nia distrikto, ne rifuzis silenti pro la tiel granda E-datreveno de la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI. Ni subtenas kaj subtenos "Nian Radion". Ni klare diras "Nian Radion", ĉar ĝi apartenas al ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo kaj pere de tiu Radio la "Verda Stelo" brilas sur la tuta terĝlobo.

Longan vivon al ĈRI kaj multajn florojn al la 45-jariĝo de la E-elsendo de ĈRI!

Gratulo de geedzoj Hans Erasmus el Nederlando:

Estis 1986, kiam ni partoprenis al nia unua UK en Pekino kaj konatiĝis kun E-elsendoj de ĈRI. Reveninte hejmen ni aĉetis specialan radio-aparaton por kapti la elsendojn. Ni admiras la 45-jaran senlacan laboron kaj sincere gratulas la 45-jaran filon de ĈRI.

Gratulmesaĝo de Dinko Matkoviĉ el Kroatio:

Viaj elsendoj fariĝis mia ĉiutaga bezono. Mi deziras, ke vi daŭrigu tiel diligente labori, ĉar ni aŭskultantoj povas unuavice multe ekscii pri diverspektoj de via vasta kaj progressa lando iranta antaŭen sur socialisma vojo, favora por bono de viaj civitanoj kaj apogo de malfeliĉuloj en la mondo kaj ankaŭ por ni esperantistoj.

Kun scivolemo kaj plezuro mi daŭrigos aŭskulti viajn disaŭdigojn ĝis kiam jaroj (jam 85) permesos al mi.

Mi deziras al vi ĉiuj agrablajn festotagojn, feliĉan kaj sukcesan Novan Jaron.

Gratulo Vjaĉeslav Suslov el Rusio:

El la tuta animo mi gratulas vin okaze de la 45-a datreveno de la Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia kaj okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de nia Majstro Ludoviko Zamenhof. Mi tutkore deziras al vi ĉiuj firman sanon, feliĉon kaj multon da novaj interesaj elsendoj.

Gratulmesaĝon sedis ankaŭ Jean Pierre Vanden Daele el Belgio, Wolmar kaj Wilson Aragão Filho kaj Clayton Ricardo Simões Pereira el Brazilo, Ivan Mattig Catalan el Ĉilio, Antonio Sarmiento el Hispanio, Hans Erasmus el Nederlando, Dimitrije Janicic el Rusio, kaj Jurgen P. Kuhl kaj multaj aliaj. Koran dankon al ĉiuj, kiuj sendis gratulmesaĝon!

Pri Koresponda laboro en la pasintaj 45 jaroj



Retrorigardante la progreson kaj disvolvon de nia elsendo okaze de la 45-jariĝo de nia elsendo, ni neniel povas forgesi la subtenon kaj kunlaboron de niaj aŭskultantoj, kiuj faris multajn kontribuojn por la hodiaŭa prospero kaj akcelis la amikecon inter la ĉina popolo kaj la respektivaj landoj. Ĉi-momente ni karmemoras la forpasintajn Bruno Najbaro el Britio, Jiri Laube el Ĉeĥio, Maurice Sujet el Francio, Josef Kondor el Germanio, Yoshikazu Takeuti el Japanio, Anita Bergh el Svedio, dank' al kiuj nia elsendo disvolviĝis ĝis hodiaŭa prospero. Ili fideleco kaj persisteco kortuŝis nin kaj ĉiam kuraĝigis nin en laboro. Ni bedaŭras, ke ni perdis tiel bonajn amikojn kaj fervorajn kunlaborantojn. Iliaj meritoj ĉiam legiĝos en la historio de nia Redakcio.

Ni plurfoje diris, ke en la mondo ne ekzistas radio sen aŭskultantoj, kiuj decidas la ekziston de la radio. Dank' al konstanta subteno de aŭskultantoj, nia elsendo fariĝis unuhora en ĉiu tago kaj la programo estas interesa, enhavoriĉa kaj aŭskultinda. Samtempe kun la prospero de nia elsendo, multe progresis ankaŭ nia trimonata kuriero Mikrofone, kiu ŝanĝiĝis de 4-paĝa ĵurnalo en la komenco de 2003 al 16-paĝa gazeto en 2007. Nun Mikrofone pli kaj pli plaĉas al la legantoj kaj ludas pli kaj pli gravan rolon de ligilo inter ni kaj niaj aŭskultantoj. Multaj legantoj donacis ĝin al siaj amikoj post legado, iuj ekspoziciis aŭ prezentis al kunsidoj de kluboj kaj lokaj E-organizoj. Kun ŝanĝo al gazetforma kaj riĉigo de la enhavo, Mikrofone pli kaj pli plaĉas al la

legantoj. Multaj legantoj donacis ĝin al siaj amikoj post legado, iuj ekspoziciis aŭ prezentis al kunsidoj de kluboj kaj lokaj E-organizoj.

ĈRI ĉiam alte atentis la korespondan laboron kaj metas ĝin sur tre gravan lokon. Ĝuste dank' al tio ĉi, en la pasintaj 45 jaroj, precipe en la lastaj 10 jaroj, la nombro de aŭskultantoj kaj tiu de korespondataj jaro-post-jare grandiĝas. Ĉi-jare la nombro de korespondataj atingis preskaŭ 9 000 de malpli ol 1 000 en la komenco de la 21-a jarcento kaj aŭskultantoj dislokiĝas en pli ol 70 landoj kaj regionoj en la mondo.

Inter ĉirkaŭ mil aŭskultantoj, kiuj tenas kun ni kontakton, ne mankas konstante fidelaj. Karine Arakejan el Armenio, Leopold Patek el Aŭstrio, George Otto Vaske el Brazilo, Ivan Asenov Budinov kaj Angel Ivanov Maglov el Bulgario, Jiri Patera kaj Josef Kriz el Ĉeĥio, Jorma Toropainen el Finnlando, Alain Chalm el Francio, Anton Kronshage el Germanio, Kornelia Nagy el Hungario, Ito Keiya el Japanio, Dinko Matkoviĉ el Kroatio, Amin Najmi el Maroko, Joop van der Hoeven el Nederlando, Henryk Zykowski kaj Kazimierz Krzyzak el Pollando, Lenke

Szasz el Rumanio, Lagutenkov Igor el Rusio, Lars Westman el Svedio. Ili estas reprezentantoj, en kies longa kontaktado kun ni okazis multe da kortuŝaj rakontoj. Pro tempomanko ni menciuj nur kelkajn: S-ro Jiri Patera estas tipa intelektulo-



aŭskultanto el Ĉeĥio. Li aŭskultas nian elsendon multe pli frue ol ke li starigis kontakton kun ni en la komenco de la oka jardeko. En la pasintaj preskaŭ 30 jaroj, li neniam rompis sian kontakton kun ni. Li aktive partoprenis en konkursoj, artikolopeto kaj aliaj aranĝoj de ĈRI kaj plurfoje estis premiita. Krome li senlace propagandas nian Radion al ĉeĥa publiko, utiligante ĉiujn ŝancojn. Kvankam li ne multe skribas al ni, ĝenerare sendas ĉirkaŭ 10 leterojn jare, tamen ĉiuj leteroj estas longaj kaj enhavoriĉaj, kun raportoj pri aŭskultado, komentoj kaj sugestoj pri nia programoj kaj bonaj ideoj rilate al plibonigo de nia programo. Li ĉiam malkaŝeme esprimas siajn opiniojn,





starpunkton pri ĉiuj okazintaĵoj en la mondo, precipe en Ĉinio, kaj informas nin pri vidpunktoj de la popolo kaj amaskomunikiloj de Ĉeĥio rilate al ĉiuj gravaj eventoj okazintaj en Ĉinio. Li ĉiam ĝojas kune kun ni pri la sukcesoj de niaj Radio kaj la atingoj kaj progresoj de Ĉinio. Ekzemple, kiam Ĉinio sukcese lanĉis la kosmoŝipon, el kiu unu kosmonaŭto eliris en la spacon por labori tie. Li tuj sendis leteron esprimante: “Tio estas plua bona ŝtupo sur la sukcesa vojo de Ĉinio en la kosmo. Tiu ĉi sukcesa evento prezentas grandan progreson ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de la tuta homaro. Tial ankaŭ mi fieras pri tio, ĉar mi sentas tion kiel ian triumfon, kiu apartenas ankaŭ al mi.”

Germana amiko Anton Kronshage kaj franca amiko Alain Chalm ambaŭ estas tre diligentaj aŭskultantoj kaj multjare invitite laboras kiel monitoroj de nia elsendo en la okcidenta Eŭropo. Ili elstare plenumis la taskon kaj faris kontribuojn por plibonigi la aŭdeblecon kaj radiolaborojn. Aŭskulti nian elsendon jam estas grava konsistiga parto de ilia vivo. Ni regule ricevas de ili detalajn aŭskultraportojn preskaŭ de ĉiu-tago

kun diversaj informoj: Ekzemple ĉe kiu frekvenco la aŭdebleco estas pli bona kaj kiam okazas bruado kaj ĝeno de aliaj stacioj kaj tiel plu. S-ro Alain Chalm kutime aŭskultas dum promenado kun sia hundo kaj samtempe notas ion. Hejmen reveninte, li tajpas raportojn laŭ la notoj. Mankas aŭskultraportoj nur en tiuj tagoj, en kiuj ili vojaĝas eksteren pro diversaj gravaj aferoj. Ĉu tio ne estas afero malfacila por ĉirkaŭ 70-jaruloj?

Kvankam gefratoj Ivan Budinov kaj Rumjana Budinova el Bulgario iom malfrue aŭskultas nian elsendon, tamen ili estas fidelaj aŭskultantoj. En 2002, partoprenante al la 87-a UK en Brazilo, ili starigis kontakton kun nia Redakcio kaj post reveno hejmen komencis konstante aŭskulti nian elsendon kaj senlace propagandas ĈRI inter bulgaraj esperantistoj. Ili aktive partoprenas en la konkursoj, artikolopeto kaj aliaj aktivadoj de Ĉina Radio Internacia kaj plurfoje gajnis bonan atingon. Ili amas la ĉinan popolon, interesiĝas pri ĉina kulturo kaj tre alte taksas la amikecon inter Ĉinio kaj Bulgario. Iufoje s-ro Budinov skribis en sia letero: “Kiam mi estis knabo, mi ŝatis sporton kaj aparte interesiĝis pri futbalo

kaj la tradicia ĉina uŝuo. Mi kaj miaj familianoj amas Ĉinion kaj estas sinceraj amikoj de Ĉinio.”

En 2004, okaze de la 55-a jariĝo de la establo de la diplomatiuj rilatoj inter Ĉinio kaj Bulgario, ili organizis sofiajn esperantistojn kolektive aŭskulti nian E-elsendon kaj poste okazigis kunsidon kun la ĉeftemo pri la amikeco inter la popoloj ĉina kaj bulgara. Sekve en la sama jaro, subtenate de ĉina ambasadorejo en Bulgario, fondiĝis la Klubo <Geamikoj de Ĉinio>. Gefratoj Budinov ambaŭ estas gravaj membroj de la Klubo kaj ĉiam fervore laboras por akceli la amikecon inter la dulandaj popoloj. Ili ofte estas gastoj invititaj de la ĉina ambasadorejo, okaze de la ĉina nacia tago kaj la Printempa Festo.

Kompreneble ĉi-foje ni nur menciis kelkajn ekzemplojn inter multaj emociigaj rakontoj.





Tutmonda vojaĝo de Alice kaj Sedrik

Alice kaj Sedrik estas geesperantistoj el Francio, kiuj nuntempe vojaĝas tra la tuta mondo per kuŝ-biciklo. Kiam ili veturis al Ĉinio, la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia festis sian 45-jariĝon. Ni do invitis ilin partopreni en nia celebrado kaj faris intervjuon al la du viglaj gejunuloj.

Mikrofone: Bonvenon! Vi scias, ke en la 19-a de decembro estas la 45-jariĝo de Esperanto-elsendo de Ĉina Radio Internacia. Ni ege ĝojas, ke ankaŭ vi povas partopreni en nia celebra aktivado. Ĉu antaŭe vi iam aŭskultis nian Esperanto-elsendon?

Sedrik: Jes, kompreneble! Kaj ni estas ege ĝojaj renkonti vin hodiaŭ. La unuan fojon kiam ni aŭskultis vian elsendon, ni tute perdiĝis en Malajzio. Ni tute ne sciis kio okazas en la ekstera mondo, ĉar ni ne havis interreton kaj televidon krom unu malgranda radioricevilo. Ni do serĉis kion ni povas trovi per la radioricevilo. Unue estis anglalingvaj programeroj, ni ne bone komprenis. Post longtempa serĉado, mi mirinde trovis elsendon en Esperanto, kaj plej ĝojinde, ke la Esperanto-elsendo venis el Ĉinio. Ni do estis ege ĝojaj. Ĉar dum nia rajdado sur biciklo, ni ne konis novaĵojn kaj tute ne sciis kio okazas ekstere. Do ni devas danki la Esperanto-elsendon, kiun ni vere ĝuis.

Mikrofone: Ĉu vi ankoraŭ memoras la programeron kiam vi unuafoje aŭskultis?

Sedrik: Jes, mi aŭskultis la programeron Leterkesto. La parolistino Shanshan intervjuis iun meksikian esperantiston pri Gripo A (H1N1). Tio vere impresis nin kaj ekde tiam ni sciis, ke cirkulas Gripo A unue en Meksikio kaj poste en la mondo.

Mikrofone: Tiu ĉi informo estas kuraĝigo al ĉiuj laborantoj de nia redakcio. Alice, ĝenerale dirite, virinoj estas malfortaj konpare kun viroj. Vi devas ĉiu-tage rajdi biciklon kun Sedrik, do ĉu vi laciĝis el tio?

Alice: Neniam fakte. Kvankam de tempo al tempo la vetero estis serioza por ni, tamen mi neniam sentis lacon kaj malĝojon estante kune kun Sedrik.

Sedrik: Mi volas emfazi, ke oni ofte diras, ke viroj estas plifortaj ol virinoj, tamen mi ne tiel opinias. Ĉar Alice ĉiam estas pliforta ol mi kaj vere bone zorgis pri mi kiam mi malsanis. Kiam ni restis en Barado, mi suferis seriozan malsanon, Alice tre bone zorgis pri mi kaj fine mi

rapide resaniĝis.

Mikrofone: Ĉu vi estas geedzoj?

Alice kaj Sedrik: Ne ankoraŭ.

Sedrik: Fakte tiu ĉi vojaĝo estas speco de ekzameno por scii, ĉu ni povos vivi kune dum la tuta vivo. Nun ni scias, ke ni sukcesis en la ekzameno. Kvankam ni pasigis la ekzamenon, tamen ni ankoraŭ volas daŭrigi la vojaĝadon kaj renkonti esperantistojn tra la tuta mondo.

Mikrofone: Dum la vojaĝado, Alice multege zorgis pri vi. Do hodiaŭ antaŭ la mikrofono, ĉu vi volas diri ion al ŝi por esprimi dankon?

Sedrik: Oh ĉu mi devas diri ĉi-tie, ke mi amas ŝin multege kaj mi amegas Alice? Mi preferas diri sole kun ŝi. Tamen mi volas esprimi mian dankon al ŝi ĉi-tie pro la longtempa zorgado dum la vojaĝo.

Mikrofone: Kvankam vi suferis de multaj malfaciloj dum la vojaĝo, tamen vi gajnis pli multe, ĉu ne?

Sedrik: Jes! Kelkfoje ni spertis tre malfacilan situacion, ekzemple iuj registaroj ne permesis nin iri al iuj lokoj per kuŝ-biciklo, kaj la problemoj de nia vizo ankaŭ estas kapdolora kaj tiel plu. Ni estis tute nervozaj. Tamen feliĉe ni ĉiam sukcesis pro kuraĝigo de unu al la alia kaj ni povis kune venki la malfacilojn. Do ni vere devas danki la vojaĝon.

Mikrofone: Dum via vojaĝo, ĉu vi renkontis multajn esperantistojn?

Sedrik: Jes! Estas tre interesa afero, ke kiam ni parolis kun iu esperantisto, li demandis min, ĉu vi konas tiun esperantiston de Nepalo? Ni diris “jes, jes!” Tio estas tre amuza kaj kvazaŭ ni estas familianoj en Esperantujo. Ni renkontiĝis esperantistojn en Germanio, Hungario, Irano, multajn esperantistojn en Irano, ankaŭ en Emirlando, en Dubai, kaj en Nepalo ni renkontis kun multaj esperantistoj. Poste en Tajlando, ni nin kontaktis kun li, tamen bedaŭrinte ne havis ŝancon renkontiĝi. Kaj en Kamboĝo ni tute hazarde renkontis iun esperantiston.

Mikrofone: Tute hazarde? Do kiamaniere?

Sedrik: Ni biciklis en la urbo Pnompeno, la ĉefurbo de Kamboĝo, sur muro de iu lernejo estis skribita en la angla lingvo “Welcome” kaj en Esperanto “Saluton!” Ni estis ege ĝojigaj vidi tion kaj demandis lokanojn kiu skribis la

vorton. Oni konigis al ni, ke iu instruisto de tiu ĉi lernejo skribis la vorton kaj tiamaniere ni renkontis esperantiston en Kamboĝo. Poste en Vjetnamio, ni renkontis multajn esperantistojn kaj ege ĝojis renkonti ilin. Kaj en Ĉinio, Japanio, ni ankaŭ konis multajn entuziasmajn esperantistojn.

Mikrofone: Alice, kio estas la plej neforgesebla kun esperantistoj dum via vojaĝo?

Alice: Estas multaj! Antaŭ nia vojaĝo nia amikino Mahliven diris al ni “Lernu Esperanton, se vi volas vojaĝi”. Do 7 monatojn antaŭ la vojaĝo ni eklernis Esperanton.

Sedrik: Sed tute ne estis diligentaj.

Alice: Ĉar ni estis tre okupitaj pri la vojaĝo kaj devis prepari multajn aferojn.

Sedrik: Ni ankaŭ devis labori por gajni monon.

Alice: Do pro tio ni ne bone lernis. Kiam ni unuafoje renkontis francan esperantiston, ni tute ne bone parolis kaj kompreneble por francoj estas plifacile interparoli en la franca, ĉu ne! Ĉi-tie ni volas saluti la francajn esperantistojn, kiuj helpis nin! Dankon!

Sedrik: Poste ni veturis al Germanio. Ni parolis samtempe la germanan, la francan kaj Esperanton kun germanaj esperantistoj.

Alice: Kiam ni vojaĝis al Hungario, ni ektimis Esperanton. Tio estas tre interesa rakonto. Ni renkotis iun Esperantan familion en Hungario, ili ĉiam parolas Esperante hejme kaj ege rapide parolis. Ĉar ni estas komencantoj kaj ne bone komprenis ilin. Ni do petis ilin “ĉu vi povas paroli iom malrapide? Ĉar ni estas tute komencantoj.” En la unuaj sekundoj ili parolis iom malrapide kaj poste denove rapidege. La unuaj du familioj, kiujn ni renkontis en Hungario preskaŭ ĉiam parolas Esperante, ni vere admiras tion. Tamen feliĉe la tria hungara esperantisto, kiun ni renkontis, parolis tre malrapide kaj ni bone komprenis lin. Kiam ni renkontis lin, ni ne plu timis Esperanton kaj denove pensis, ke Esperanto estas bona lingvo.

Sedrik: Kiam ni vojaĝis en Rumanio kaj Bulgario, estis ferioj. Do ni ne renkontis esperantistojn. Poste en Irano, ni renkontis multajn esperantistojn kaj pere de ili ni sentis, ke Esperanto estas lingvo de libereco.

Mikrofone: Vi ĵus diris, ke vi lernis Esperanton antaŭ 7 monatoj. Do ĉu vi mem lernis ĝin aŭ partoprenis en kursoj?

Sedrik: Ni aliĝis iun rapidan kurson. En 13 lecionoj ni povas koni ĉion el la reguloj de Esperanto. Kaj en libertempo ni praktikis kun iuj francaj esperantistoj. Fakte dum la vojaĝado ni ankaŭ multe praktikis Esperanton.

Alice: Kaj dum nia vojaĝo ni ĉiam propagandas Esperanton. Ni spertis multe survoje inkluzive de diferencaj prononcoj de diverlandaj esperantistoj, tamen ni preskaŭ ĉiam bone komprenas ilin, krom la du hungaraj familioj.

Sedrik: Kaj ĉu vi povas imagi, ke ankaŭ iliaj hundoj parolas Esperante! Se ni diras “venu, por promonado”, ili bone komprenas. Se vi parolus aliajn lingvojn krom Esperanto, la hundo povas kompreni nenion.

Mikrofone: Mi unuafoje aŭdis, ke ankaŭ hundo povas paroli, precize kompreni Esperanto. Tio estas vere interesa informo. Do kien vi veturos post Ĉinio?

Sedrik: Ni vojaĝos al Moskvo, Rusio. Poste ni veturos al Ukrainio, kaj poste per ŝipo al Istanbul, poste al Grekio, Italio, Tunizio, Alĝerio, Maroko, Hispanio kaj tiel plu.

Mikrofone: Do kiam vi revenos al Francio?

Sedrik: Post preskaŭ unu jaro.

Mikrofone: Bonan vojaĝon al vi Alice kaj Sedrik! Jam venas la jaro 2010, ĉi-tie mi deziras al vi feliĉan novjaron kaj ĉion bonan dum la vojaĝado.

Alice: Koran dankon al vi! Ankaŭ feliĉan novjaron al ĉiuj kaj mi esperas, ke ĉiuj zorgos pri medio en la nova jaro. Ĝis!



Resumo pri la Konkurso de Scioj pri la “60-jariĝo de la Nova Ĉinio”

Sukcese finiĝis la Konkurso de Scioj pri la “60-jariĝo de la Nova Ĉinio”, okazinta de la 1-a de junio ĝis la 1-a de septembro. Fine venis pli ol 40 kontribuajoj el Alĝerio, Armenio, Aŭstralio, Brazilo, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio kaj aliaj sume preskaŭ 20 landoj.

Post juĝado, japana amiko Ito Keiya gajnis la unuan premion; Karine Arakeljan el Armenio kaj Reinaldo Marinho el Brazilo gajnis la duan premion; La trian premion gajnis respektive Alice Amalia Klein el Brazilo, Mitsunori Kawazoe el Japanio kaj Edeltraut Henning el Germanio. Krome, ĉiuj partoprenintoj, kiuj ĝuste faris respondojn al la 10 demandoj, ricevos premiaĵojn.

Gratulon al la premiitoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenintoj!



CHINA RADIO INTERNATIONAL
中国国际广播电台

★ 世界语广播开播45周年
JUBILEO DE ESPERANTO - DISAŬDIGO DE
ĈINA RADIO INTERNACIA

Resumo pri artikolopeto okaze de la 45-jariĝo de E-elsendo

Celebre al la 45-jariĝo, ni okazigos artikolpeton kun la temo: “Mi kaj la 45-jara E-elsendo”. Dank’ al fervora subteno de diverslandaj aŭskultantoj, fine venis al ni preskaŭ 40 kontribuajoj kun gratuloj kaj bondeziroj el Armenio, Aŭstrio, Azerbajĝano, Brazilo, Britio, Bulgario, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Korea Respubliko, Nederlando, Litovio, Nepalo, Norvegio, Pollando, Svedio kaj aliaj sume preskaŭ 20 landoj.

Post juĝado, 10 amikoj gajnis premiaĵojn. Ili estas Nina Bzhikyan el Armenio, Reiner Kocher el Aŭstrio, Arno Jose Volkmar el Brazilo, Angel Ivanov Maglov el Bulgario, Jorma Toropainen el Finnlando, Joop van der Hoeven Nederlando, Algimantas Piliponis el Litovio, Urszula Mokrzycka kaj Jan Klocek el Pollando, Lars Westman el Svedio. La premiaĵojn ni sendos sinsekve ĉe la jarfino. Ni esperas, ke la premiaĵo plaĉos al vi.

Gratulon al la premiitoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Mikronovelo – 微型小说



Sansan kaj Sasa

Sansan kaj Sasa, tre intimaj, jam edziniĝis respektive.

Post la nupto, la edzo de Sansan sin anoncis kaj estis varbata al supera lernejo por plenkreskuloj. Li solene asertis, ke vivante en la mondo oni devas fari io meritan.

Post la geedziga ceremonio la edzo de Sasa veturis al la suda insulo Hainan, deklarinte ke se oni ankoraŭ vivas en la mondo, oni ja devas ion indan nepre fari.

Sentante enuon en la soleca vivo, Sansan faris viziton al sia amikino Sasa.

Ili babilis pri la tero kaj ĉielo, pri monto kaj rivero, pri maro kaj kontinento, unuvorte pri ĉio, sed plej multe pri respektiva edzo.

Paradante per sia edzo, Sansan diris, ke certe scioj, de li lernataj en la provinca ĉefurbo, estos utilaj, malgraŭ ke li ne povas gajni pli da mono nun. Fakte ŝi plendis en la koro, ke ŝi devas sendi monon, ĉiam nur monon,

al la edzo, kiu stulte rezignis la grasan profesion kaj, forlasinte ŝin, kuris al la provinca ĉefurbo por la tiel nomata klerigo.

Forte laŭdante sian edzon, Sasa asertis ke sen klereco oni, havante ekonomikan cerbon, same povas sin riĉigi. Fakte al ŝi mankis spirita konsolo, ĉar ŝi ricevadis nenion romantikan, sed nur monon, ĉiam monon, alsenditan de la edzo, luktanta en la suda provinco Hainan por gajni pli kaj pli da valorpaperoj, povantaj nur luksigi la vivon tamen neniel riĉigi la animan mondon. Ŝi do kaŝis solecon en la koro.

Ekstreme amaris la koro de Sansan; ege tristis Sasa.

Itutage Sansan ricevis leteron de la edzo kiu sciigis, ke li, diplomite el la plenkreskula universitato, veturis al la suda insulo Hainan, ĉar, laŭ li, oni devas ne nur posedi sciojn, sed ankaŭ havi monon; tiam li anoncis sin al la supera lernejo

ĝuste por hodiaŭ gajni multan monon en Hainan. Liaj vortoj forte surprizis la edzinon.

La edzo de Sasa letere informis, ke plenkreskula lernejo de Hainan jam varbis lin; li opiniis, ke oni devas ne nur gajni monon, sed ankaŭ lerni sciojn. Tiam li veturis al Hainan ĝuste por rami solidan ekonomian fundamenton sur kiu li povu bone lerni ion. Sasa forte surpriziĝis.

Poste, Sansan ricevadis monon de la malproksima edzo; ŝi do sentis sin riĉa kaj feliĉa. Siaflanke la edzo de Sasa ofte alsendis leteron, plenan de amaj vortoj, kaj ŝi estis mielata kaj beata.

Sansan kaj Sasa eĉ pli intimiĝis. Preskaŭ en ĉiu tago ambaŭ babilis pri la edzoj, sentante jam ne solecon nek amaron aŭ triston, sed lulan dolĉecon kaj paradizecan feliĉon.

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>



Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: espradio@cri.com.cn

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang